**Foriras do la kunludintoj**
*(Elmennek hát a játszótársak)*

Hierau mi audis lian mortofamon.
Nekomprenebla distanco kunpremis mian koron.
Fremda mondo; iamaj junaj entuziasmadoj,
kredoj kaj sopiradoj,
esperitaj kaj veraj sukcesoj, obstina kontrauado,
mankuvo da esperoj – jam nur la trankvilo.
Foriras do la kunludintoj,
kaj la silento chiam pli lauta.
Tie sur la herbejo,
ambauflanke de kampolimo
geknaboj ludas.
„Birdeto, ho birdeto
sangumas via flugilo”.
Chirkaukuras la mondon.
Solduloj de la futuro.
Ghiaj sopiradoj.
Ghiaj esperoj.
Ghiaj amoj.
Ghiaj mortoj

Cheneroj en la cheno.

Amen

Tradukita de János Ruff